

Andreas Schramek: La egipta trilogio

Miroslav Malovec

prelego la 9-an de marto 2016 en EK Brno

Andreas Schramek (1958) estas gemana verkisto, studinta juron, kiu okupiĝas pri egiptologio. Grandan sukceson li akiris per sia trilogio Amenofiso, Aĥnaton, Tutanhamon.

La romanon rakontas sepdekjara faraono Aje, kiu surtroniĝis post Tutanhamon. Li volas kontroli, ĉu lia kriptoj en la Valo de Reĝoj estas ornamita laŭ lia deziro, sed ĉar li malbone vidas, li ordonas, ke lin akompanu 16-a vilaĝa knabo, hazarde renkontita. Aje eniras la kriptoj kun la knabo portanta torĉon kaj demandas lin, kion li vidas sur la muroj. La knabo ne povas al li mensogi. Kiam li konvinkiĝas, ke ĉio estas farita laŭ lia deziro, li revenas en la palacon eĉ kun la knabo, ĉar li sopiras rakonti al tiu pura animo la historion de sia vivo. Al la gepatroj li sendas sciigon, ke la knabo restos dum kelkaj tagoj en la palaco.

Lia patro estis Juja, instruisto de reĝaj kaj korteganaj infanoj, tial ankaŭ la malgranda Aje vizitis lian lernejon kune kun la kronprinco Amenofis kaj lia pli juna frato. Tiu pli juna reĝido estis iomete malica kaj foje puŝis Aje-n en basenon. Ĉiuj ridis, sed Amenofis saltis en la akvon kaj helpis al Aje eliri. Poste lin invitis en siajn ĉambrojn, kie servistinoj vestis ilin en sekajn vestojn. El la knaboj fariĝis la plej bonaj amikoj, la princo eĉ donis al li titolon Sola Amiko de la Kronprinco. En sia 16-a jaro la princo fariĝis plenkreska kaj nelonge poste mortis lia patro Tutmose, Amenofis fariĝis mem faraono. Li enamiĝis al Teje, fratino de Aje, kaj faris ŝia Granda Edzino de la faraono. Tiel kreskis la signifo de la familio, Juja fariĝis konsilanto de la juna reĝo kaj ankaŭ Aje, kvankam nur 15-jara, ricevis diversajn taskojn. Kiam li estis 18-jara, li estis sendita kiel diplomato al Mitanio, de kie li venigis sian edzinon. Post unu jaro naskiĝis al li filino Nefertiti, sed la patrino dum akuŝo mortis. Amenofis kaj Teje jam havis filon Tutmose kaj nun naskiĝis al ili ankoraŭ dua filo Amenhotep. Tutmose estis edukata kiel estonta faraono, sed la edukado de Amenhotep kaj Nefertiti estis konfidita al Aje. Li edziĝis kun Ti, vartistino de Neferititi, por ke la bebo ne restu sen patrino. Aje ricevis titolon Dia Patro Aje.

La juna faraono volis omaĝi al la plej supera dio de Egipto, Amono, per nova templo. Dum konstruado liaj plu junaj frato kaj fratino iris rigardi la templon, sed la eŝafodo subite falis kaj mortigis ilin. La dolorplena faraono ordonis ruinigi la templon kaj komencis adori aliajn diojn, kiel Re, Anubis, Aton kaj aliaj. Lia filo Amenhotep montris intereson pri religiaj aferoj, ankaŭ pri historio kaj arto, kaj kune kun Nefertiti komencis adori Atonon, t.e. Sunon. Amenhotep asertis, ke aliaj dioj ne ekzistas, ĉar la vivo floras ankaŭ en aliaj landoj, kiuj ne kredas pri la egiptaj dioj, sed ĉiujn landojn benas la radioj de Suno. Ankaŭ en arto li postulis la veron, ne tradician ŝablonon, kiu estis por artistoj deviga eĉ sub minaco de morto. La veran arton ili devis fari sekrete.

Kiam la kronprinco Tutmose estis dudekjara, venis informo, ke oni trovis lin foje matene morta. La kronprinco fariĝis Amenhotep. Lia patro timis, ke oni povus senigi lian filon de la faraoneco, tial li proklamis lin sia kunreganto. Amenhotep fariĝis ankaŭ faraono kaj prenis Nefertiti kiel sian Grandan Edzinon. Li ŝanĝis sian nomon al Aĥnaton, amanto de la suno, kaj komencis konstrui novan urbon Aĥetaton. Ĉiuj pensis, ke la konstruado daŭros jarcentojn, sed la faraono montriĝis geniulo. Li sciis organizi ĉion tiel, ke post kelkaj jaroj la urbo estis konstruita kaj li ĵuris, ke li neniam forlasos la urbon.

La maljuna faraono Amenofis venigis el eksterlando novan edzinon, reĝidinon Kita, sed li mortis pli frue ol li povis kun ŝi kunkuŝi. Aĥnaton ne volis alveni por aranĝi la funebro de la patro, ĉar li ĵuris, ke li neniam forlasos Aĥetaton. Tial li proklamis sian edzinon Nefertiti sia kunreganto, sed sub vira nomo Smenchkare, kaj sendis ŝin al Memfiso ĉion aranĝi. Ŝi poste okupiĝis pri praktikaj aferoj de la lando, dum Aĥnaton faris religian reformon. Proklamis Atonon sola dio kaj aliajn diojn malpermesis. La pastroj lin kompreneble opiniis herezulo kaj krimulo.

La principon Kita oni sendis al Aĥnaton, kiu tuj enamiĝis al ŝi, same kiel Aje. Tiu ŝin amaris sekrete kaj kiam naskiĝis filo Tutanhaton, Aje mem ne sciis, kiu estas lia patro, ĉu la

faraono, aŭ li mem. Oficiale estis patro la faraono, nur Aje kredis, ke eble la bebo estas lia. La patrino dum akuŝo mortis. Aje iĝis zorganto pri la knabo, tiom pli fervora, ke Nefertiti-Smenchkare malamis la bebon kiel bastardon. Ŝi koleris, ke ŝiaj tri filinoj ne povas iĝi faraonoj, nur knaboj, eĉ bastardaj. Foje oni trovis Aĥnatonon morta kaj Smenchkare fariĝis sola faraono. Ŝi tuj komencis la knabon, jam kvinjaran, persekuti. Aje kun li forkuris al dezerto, sed estis atingita de la faraonaj soldatoj. Je lia surprizo, la soldatoj komencis riverenci al la knabo kaj nomis lin faraono. Nome, Nefertiti kaj ŝiaj du filinoj estis strangolitaj de nekonata krimulo. Nur la tria filino restis, ĉar ŝi kaŝiĝis en korbo.

Aje proklamis ŝin edzino de Tutanĥaton kaj tiamaniere certigis la tronon por la knabo. Baldaŭ revenis la kulto de Amono, oni devis ŝanĝi la nomon al Tutanĥamon. Gravulo en la lando fariĝis generalo Haremheb, ĉar dum la religia regado de Aĥnaton kaj Nefertiti la malamikoj komencis minaci la landon. Kiam Tutanĥamon estis 19-jara, aperis ĉe li dolor-atakoj en la kapo kaj unu matenon oni trovis lin morta. Aje proklamis sin faraono kaj klopodis konservi la memoron pri la reĝa familio, ĉar li sciis, ke post li iĝos Haremheb la faraono kaj klopodos ĉiun memoron neniigi.